


GAZETO ESPERANTISTA ELIRANTA LA 15^{an} DE ĈIU MONATO.

LA BELGA SONORILO

JOURNAL ESPERANTISTE BELGE
MENSUEL.BELGISCH ESPERANTISCH
MAANDSCHRIFT.

Oficiala Organo de la « Belga Ligo Esperantista » kaj de la Belgaj Ligaj Grupoj.

Organe officiel de la « Ligue Espérantiste Belge »
et des Groupes Belges affiliés.

Officieel orgaan van den « Belgischen Esperantischen
Bond » en der Belgische aangesloten Groepen.

REABONOJ.

Kelkaj el niaj fremdlandaj amikoj ĝis nun ne pagis sian abonon por la jaro kiu komencis pasintan monaton, kvankam ni avertis ilin per nia cirkulero de la 1^a de Aŭgusto kaj per nia septembra n^o.

Ni petas ke ili bonvolu ne prokrasti sian pagon, se ili deziras ke ni daŭrigu al ili la sendon de nia gazeto.

La jena n^o estas la lasta kiun ni disdonos senpage. Tiuj kiuj ne deziras reaboni bonvolu ĝin reŝendi.

Ni rememorigas ke ni akceptas pagon ĉu per poŝtmandato, ĉu per poŝtmarkoj. Tiujn ĉi ni akceptas laŭvalore.

J. COOX.

Réabonnements.

Nous constatons avec regret le peu d'empressement que mettent nos amis belges à nous aider dans notre tâche.

Par notre circulaire du 1^{er} Août et par notre numéro de Septembre, nous leur demandions de nous faire parvenir le plus tôt possible le montant de leur abonnement pour l'année qui commençait.

Si beaucoup de nos amis nous ont déjà obligamment donné satisfaction, il en reste un nombre, à notre avis trop grand, qui paraissent manquer totalement de sens pratique, ce qui va nous obliger à consacrer les soirées de toute une semaine à la confection de quelque deux ou trois cents quittances postales, avec tout le travail accessoire qu'elles comportent.

Pour nous épargner cette énorme perte d'un temps que nous pourrions utilement consacrer à des choses plus intelligentes, il suffirait que chacun eût la bonne idée — et le courage — de mettre sous enveloppe un bon-poste, ou même tout simplement des timbres-poste, pour une somme de 4 frs (5 frs pour les membres de la Ligue) et de jeter cette enveloppe dans une boîte postale.

A ceux qui, malgré tout, trouveraient que ce petit travail dépasse leurs forces, nous ferons présenter le 31 Octobre une quittance de fr. 4,20 (5,20 pour les membres de la Ligue).

Nous prions ceux qui n'ont pas l'intention de se réabonner, de vouloir bien nous retourner les n^{os} de la 5^e année reçus gratuitement. Cela nous épargnera une double perte et de temps et d'argent.

N. B. — Le présent avis ne concerne pas ceux dont l'abonnement est payé par les groupes.

J. Coox.

Vernieuwing van abonnement.

Wij stippen met spijt aan dat onze Belgische vrienden weinig iever bijzetten om ons in onze taak te helpen.

Door onzen omzendbrief van 1^{en} Oogst en in ons nummer van September, vraagden wij hun ons het bedrag hunner inschrijving voor het beginnend jaar zoohaast mogelijk te doen geworden.

Velen onzer vrienden, wel is waar, hebben ons hierin reeds voldoening gegeven; nochtans zijn er, onsdunkens, te veel achterblijvers die weinig praktisch oordeel schijnen te bezitten en ons zullen dwingen gansche uren te verspillen aan het opmaken van eene twee, driehonderd postkwijtbrieven en aan al de bezigheid die zulk werk na zich sleept.

Om ons dit overgroot verlies van tijd te besparen, welken wij op nuttige wijze aan ernstiger zaken zouden kunnen besteden zou het voldoende wezen dat ieder tot de goede gedachte kwame en er den moed toe hadde — een postmandaat of zelfs heel eenvoudig, voor eene som van 4 fr. voor de leden des Bonds) postzegels onder omslag te steken en dit naar de eerste de beste brievenbus te dragen.

Aan hen, die zelfs dit middeltje zouden te lastig vinden, zullen wij op 31^{en} Oktober eenen kwijtbrief van fr. 4,20 (5,20 voor de leden des Bonds) aanbieden.

Wij dringen er op aan, dat degenen die zinnens zouden zijn hunne inschrijving niet te hernieuwen, ons de n^{os} van het 5^e jaar, die zij kosteloos ontvangen hebben, zouden terugzenden; dit zal ons een dubbel verlies en van tijd en van geld besparen.

L. W. — Het tegenwoordig bericht geldt niet voor hen, wier abonnement door de groepen betaald wordt.

J. Coox.

Monata babilajo.

BELGA SPRITECO.

Ĝi estas stranga, vere stranga.
Kompreneble.

Ĉar ĉu en la mondo ekzistas du estaĵoj tiel malsimilaj kiel Franco kaj Germano? Mi tute ne aludas iajn apartajn trajtojn de ilia karaktero, kiel la "kaizer"-an amegaĉon, la deziregon al pli-kaj-plia malplenigo de Bierglasoj kaj plialtigo de l' kruroj ĉe l'unuj, kaj ĉe la aliaj la senliman klerecon de la oficistoj kaj de la ĝendarmoj, la kantadan nesaniĝeblan malsanon, kaj ankaŭ kion mi nomus: la "skandalismo", tio estas la bezono ĉiam mirigi la tutan mondon per senĉesaj skandaloj (mi ne volas nomi tiujn de la lastaj jaroj: la loko al mi rezervita ne sufiĉas). Ne, mi aludas nur la manieron laŭ kiu ambaŭ ridas kaj montras sian spritecon, kaj mi rediras: nenio estas pli malsimila al la germana ŝerco ol la franca rido kaj, se la unuan mi komparus al ampleksa kaj ĝojema bovo, certe la duan mi montrus per lertega kaj gaja hirundo.

Nu, vi diros, kian rilaton havas la belga spriteco kun tiu bovo kaj tiu hirundo? Ho, tre intiman rilaton, karaj legantoj, eĉ kiel eble plej intiman: ĝi estas ilia monstra ido!

Dum la pasinta jaro, okaze de l' festoj pri la 75^a datreveno de l' belga sendependeco, ni ĝuis tre amuzigan spektaklon: kiel antikva Diogeno portante dum la tago lumantan lanternon kaj al ĉiuj ripetante: "Mi serĉas viron", ĉiuj niaj verkistoj, inspirataj de ŝovinisma kortuŝeco, ĉiuflanke plendadis, ripetadante: "Ni serĉas animon, ni serĉas la animon belgan". Multaj ĝin trovis: almenaŭ tion ili kredis, kaj per triumfaj artikoloj pri la "âme belge", ili tion anoncis al mirinta Belgujo kaj detale priskribis la novenaskiton, agrable miksaute la kvalitojn de la latina kaj de la germana raso.

Ridinde!

Ĉar la du tre diversaj rasoj kiuj loĝas en Belgujo, nepre konservis sian apartan karakteron kaj neniel kunfandiĝas nek amas sin reciproke: ili havas ne komunan sed ĉiu vere apartan animon. Ne bedaŭrinde: ĉiu scias ke la naturo abomenas la miksiĝon de la diversaj specoj kaj, se ĝi tion toleras, almenaŭ ĝi ŝerceme montras sian malkontentiĝon per la nasko de ia monstra estaĵo. Tial, mi terure min demandas kia monstro naskiĝus el la ama kunfandiĝo de niaj du belgaj animoj.

Tion jam antaŭmontras, ja, (ni revenu al niaj ŝafoj, kiel diras la Francoj, kvankam tiuj ŝafoj estas ĉi tie bovo kaj hirundo) la speciala karaktero de la belga spriteco: ia stranga tripeda monstraĵo kiun, ĉe iaj lokoj, naskis la kontraŭnaturaj interrilatoj de la germanrasa ridema kvarpedulo kun la latina dupieda birdeto.

Aŭskultu: jen kelkaj ekzemploj de belga spriteco. La pasintan jaron, en Bruselo okazis publika

kurado de lignakruraj lamuloj! Ĵaluzaj je ilia sukceso, alia interesa parto de l' homa gento: la cent-kilogramuloj (pli mallonge: la cent-kiluloj) organizis ankaŭ, en la sama tempo, publikan kuradon tra la stratoj de Bruselo! De tiam, tiuj ampleksaj sinjoroj, konsciantaj je sia eminenteco, kreis specialan ĵurnalon, kaj antaŭ kelkaj tagoj organizis en Lieĝo serion da festoj, kies ĝojiga programo estis jena:

Dimanĉon, 9^{an} de Septembro

Festoj de l' Cent-Kiluloj.

Konkurso por la plej dika ventro; premio: unu litro da "Eau de Cologne".

Konkurso por la plej dika kruro, — 6 pecoj da ŝapo.

Konkurso por la plej bela vizaĝo, — 6 boteloj da vino de Malaga.

Konkurso por la plej granda piedo, — 6 boteloj da vino.

Konkurso por la plej malgranda piedo, — 1 cigaringo.

Konkurso por la plej granda talio, — 2 kestetoj da bonegaj cigaroj.

Konkurso por la plej peza, — 2 kestetoj da bonegaj cigaroj.

Konkurso por la plej malproksima, — diversaj objektoj.

Post la konkursoj, granda balo!

!!!

Sed ne estas ĉio!

Eĉ la ĉarmega banurbeto Spa sentis la bezonon imiti tiujn laŭindajn ekzemplojn, kaj ĝi ĵus organizis kuradon de ... tripeduloj! Sendube la fama komedio de S^o T. Bernard kaj A. Godfernaux: "Triplepatte" (Tripedulo) iuspiris tiun mirindan ideon. Ne serĉu, amikoj, kio estas tripedulo: vi ne trovos. Tute simple, ĝi estas du homoj kunligitaj ĉiu je unu kruro!

Certe kurado neniam vidita!!

Sed ĵus ensaltis en mian cerbon miriga ideo. Mi, mi fine trovis l' "âme belge", la animon belgan, de tiel longe sed ĉiam vane serĉitan. Ĝi estas "Triplepatte"!

Ĉar ankaŭ ĉu la du animoj, germana kaj latina, de nia lando, kvankam vere aparte kaj tamen kune vivantaj, ĉu ambaŭ ne estas nedisiĝeble kunligitaj je unu kruro?!

Formoviĝis la senesperiga mistero. Ni ĝoju, amikoj belgaj, nia lando ankaŭ posedas animon, kaj la kurado, de nun fama je eterne, la tripedula kurado de Spa aperigis ĝin en ĝia brilega gloro.

Jes, ni havas animon, sed, kiel nia spriteco, ĝi ankaŭ estas tripedula! Triplepatte!

Triplepatte, la animo belga!

Ĉiuj, ni estas Triplepatte!!

SENHAVULO.

Telepatiaj fenomenoj.

Tiun vesperon, dum kutima kunveno ĉe nia bonega amiko Majerato, oni interparolis pri « *Kaŝataj Sciencoj* » kaj « *Spiritismo* »; sed videble neniu el ni tre konis tiujn « Sciencojn », kaj neniu povis igi interesa la interparoladon pri tio.

— Al la diablo, tiuj ĉi fantomoj! — ekkriis la dika kaj ĝojema Daŝlet. — Tio estas ŝercaĵo, per k' u oni trompas nur la naivulojn. Mi ne kredas je tio. La mortintoj ne revenas, kaj eĉ ne parolas; alie, ili ne estus mortintoj!

— Brave! Brave! — diris la dommastro; — sekve ni trinku kaj ridu dum ni estas vivantoj!

Ĉiuj ridis kaj trinkis; escepte nia amiko inĝeniero Lakorto, kiu tre serioze diris:

— Mi nescias ĉu la mortintoj revenas; sed ke ili interkomunikas kun la vivantoj, mi estas certa, tute certa; ĉar.....

Hore oni ekkriis: « Ha! rakonto! diru al ni tiun mirindajon! »

— Mirinda, eble; sed ja tute vera estas mia rakonto; tion mi certigas. Sinjoroj, ni preskaŭ ĉiuj estas samurbanoj, kaj kelkaj el vi eble ankoraŭ memoras pri Teodoro Lambert? »

— Teodoro Lambert? ja! oni ne povas forgesi tiun malfeliĉan junuon, kiu mortis estante dudekjara.

— Nu! Teodoro estis mia amiko, kvazaŭ mia frato. Ni estis samaĝaj; liaj gepatroj kaj la miaj ĉiam havis la plej korajn interrilatojn. Ni travivis niajn infanjarajn inter la samaj ludoj, la samaj plezuroj, la samaj ĉagrenetoj. Ni lernadis ĉe la sama kolegio, kaj estante dekokjaraj, ni samtempe eniris la Lovenan Universitaton.

Tie niaj lernadoj fariĝis malsimilaj, ĉar li elektis la legosciencan; sed post la kursoj oni ĉiam vidis nin kune. Tial niaj kamaradoj nomis nin « Oresto kaj Pilado ». Ian tagon, Teodoro al mi diris: — « Baldaŭ, post du jaroj, ni disiĝos: vi estos inĝeniero, mi advokato. La okazontaĵoj de nia vivado fortiros ĉiujn el ni malproksimen de l' aliaj. Sed kia ajn estos la interspaco, kiu nin disiĝos, ni ĵuru, ke ĉiujare ni ambaŭ kunvenos unu tagon en tiun ĉi universitatan urbon. »

Tion ni ĵuris!.....

Sinjoroj, vi scias kiel, glitumante, li dronis en la kanalon. Oni entirigis lin en la Lovenan tombejon. Kia bato! Kia ŝiro! Mi kredis, ke mi ĉion perdas, kaj mi revenis en mian familion, apud miajn gepatrojn, por ke ilia amo iom revivigu mian koron.

Post du jaroj mi forlasis la Universitaton; sed, ĉiujare, je la morta datreveno de mia amiko, mi revenis Lovenon por preĝi sur lia tombo. Dum dek jaroj mi fidele plenumis tiun pilgrimon.

Kiam mi reeniris la urbon, kaj precipe kiam mi alvenis en la tombejon, kie mia amiko je eterne dormadas, amaso da antaŭtempaj memorajoj ekplenigis mian spiriton, kaj la vundo de mia koro remalfermiĝis. Sed, iom post iom, la necesajoj de la vivado, la malfacilaĵoj de la aferoj ensorbis min pli kaj pli: la memoro pri mia amiko fariĝis malpli dolora kaj pli malofta. Tia estas la homa koro! La tempo plidolĉigas ĝiajn plej profundajn vundojn. Ĉu tio estas bedaŭrinda?... Fine, mi ne reiris plu Lovenon. Sendube, mi tion

konfesas, mi estis ĵurinta, ke mi, unu fojon ĉiujare, tien kunvenos kun mia amiko; sed ĉu lia morto ne estis rompinta nian duopan promeson? Tion mi opiniis, kaj tamen....!

Ian tagon, miaj aferoj estis min alkondukintaj en la Luksemburgan provincon. Mi estis trovinta nur malnovan veturilon, kiun malfacile trenis maljuna kaj malgrasega ĉevalo. Oni estis en Januaro. Plene degeladis. La malgranda rivereto, kiu borderas la vojon, fluis kvazaŭ torenteto pro la fluidiĝo de la neĝo. Jam de unu horo mi veturis, ekvidinte nek homon nek domon. Mi sentis min kvazaŭ forlasita. Nedirebla malĝojo estis enirinta min. Mi sentis malprecizan subpremiĝon, nedefinitan malkontentiĝon pri mi, kaj eĉ kvazaŭan timon, eble. Kulpulo aŭdante sian konsciencan estas kredeble en la sama stato..... Dato aperis al mia spirito.

Estis la 30^a de Januaro. Ĝi estas la datreveno de la morto de Teodoro Lambert. ... Sed ĉe la sama momento mian rigardon altiris io malgranda, kiu naĝis sur la akvo de la rivereto. Ĝi ŝajnis kartona peco, kiu pro sia formo kaj sia amplekso, similis ludkarton. La fluo de l' akvo estis sufiĉe rapida por ke tiu objekto havu la saman rapidecon kiel la troto de mia ĉevalo. Tio min iom ekamuzetis. Mi admiris tiun malgrandan naĝanton, kiu kuraĝe antaŭeniras malgraŭ la herberoj klinataj sur la akvo. Poste, ŝajnis al mi mirinde, ke ĝi estas ĉiam ĝuste apud mi, nek pli nek malpli rapidante ol mi. Eĉ, baldaŭ tio ŝajnis al mi stranga; kaj mi ekrigardis la kampojn kaj la arbojn. Kelkajn minutojn poste, mi ree rigardis la rivereton. La objekteto ĉiam ĉeestis, dancante sur la ondetoj. Ĝia vidiĝo min tedis kaj mi fermis miajn okulojn. Kiam ilin mi malfermis, mi turnis min por rigardi la alian flankon de la vojo. Ho! teruro! Mia persekutanto estis tie!...

La rivereto, pasinte sub la vojo, fluis nun ĉe la alia rando. Mi ordonis ke la veturigisto haltigu la veturilon, por ke l' objekteto foriru antaŭen kaj malaperu. La veturilo haltigis. Sed dika tufo da herboj kontraŭstaris la naĝanton, kiu samtempe haltigis ankaŭ. Furiozige mi malfermis la porteton; kaj, elsaltinte sur la vojon, mi ekkaptis la objekteton. Ĝi estis fotografajo! Je ĝia vidiĝo mi ekstremetis, kaj miaj okuloj preskaŭ ekblindigis; ŝanceliĝante mi reeniris la veturilon....

Ĝi estis la portreto de Teodoro Lambert, kun la jena enskribaĵo: « *Memoru pri mi* ». La portreto (de dudek jaroj farita en Loveno) estis iom paligita de l' tempo; sed la skribaĵo (mi rekonis lian skribmanieron) ŝajnis pli nova! »....

La inĝeniero silentiĝis kaj ni ankaŭ, pripensante, longatempe silentis.

Fine Majerato diris:

— Tio estas tre stranga afero; kaj ŝajnas al mi, ke blinda hazardo ne povus naski tian faskon da faktoj tiel kune trafantaj la saman celon.

— Eble tio estas neklarigebla, sed ja tute vera — certigis Lakorto.

— Amiko, mi vin kredas, diris la pripensema Miŝel, — ĉar, kiel diris « Shakespeare » en sia « Hamleto »:

STILO KAJ MODELO.

LA BELGA SONORILO ne akceptas respondecon pri opinioj esprimataj.

La legantoj de nia fidela BELGA SONORILO kiuj atente legis la artikolon de S^{ro} Frans Swagers en la antaŭa numero : **Niaj du gvidaj libroj en Esperanto**, estas ricevintaj, almenaŭ la plimulto, impreson pli duban ol certan pri la bona stilo rekomendita de D^{ro} Zamenhof, stilo kiun oni ĉefe trovas en la **Fundamenta Krestomatio**.

Kiel en ĉiuj libroj kiuj kolektas verkojn de diversaj aŭtoroj, la Krestomatio enhavas malsamajn formojn kaj eĉ strangajn uzojn de akuzativo.

Feliĉe, ni ne devas konsideri la cititajn frazojn kiel esencen de la supredirita verko; ili estas ĉerpitaj kun speciala intenco de monstro kaj se, inter ili, oni trovas kelkajn frazojn nekorektajn, tio ne estas grava. Mi eĉ opinias ke Esperanto estas sufiĉe etendebila, fleksebla, por akcepti ĉiujn formojn kiuj estas nedubaj kaj kompreneblaj.

En la antaŭparolo de Fundamenta Krestomatio, Zamenhof rajte diras ke la prezentita libro « povas servi al ĉiuj kiel modelo de Esperanta stilo kaj gardi la lingvon de pereiga disfalo je diversaj dialektoj. » Tie sin kaŝas la danĝero : traduki laŭvorte la frazojn iafaje tre nelogikajn kiujn ni uzas ĉiutage en niaj gepatraj lingvoj.

Modelon oni devas respekti, kaj, en la detaloj, oni povas inteligente kaj lerte ĝin kompreni, tiamaniere ke oni ricevos ne trivialan kopiaĵon, sed similaĵon kvazaŭ spritan, kvankam fidelan kaj regulan.

La glora pentristo Rafaelo ne kopiis siajn modelojn; li tradukis ilin per genia kompreno, aldonante iom da tiu arta inspiro, kiu esta la propra eco de la genio. Mi ne intencas nin kompari al tiu geniulo, sed mi opinias ke tiu, kiu skribas laŭ la reguloj de la lingvo kaj kies stilo estas neduba, klara, simpla kaj flua, estas tute prava malgraŭ la negrava malsimileco kiun oni povas renkonti en tia stilo.

La lingvo Esperanto akiros pli kaj pli puran internacian formon, sed ĝi nepre devos resti ĉiam egala, simpla kaj klara. Kvankam oni devas uzi la lingvon egale, oni povas riĉigi kaj perfektigi regule sian stilon; sed super ĉiuj aliaj vidpunktoj, oni devas prezenti klarecon kaj atente observadi la spiriton de la lingvo.

Ekzemple pri la akuzativo, estas certe ke la spirito de la lingvo postulas uzon de ĝi *kiam la vorto montras la lokon kien oni iras* (regulo 13^a).

Tiel la frazo : Mi povas vin kaŝi en mian poŝon, (p. 61^a) estus tre bone komprenebla se mi skribus : « en mia poŝo » ĉar dubo ne povas naskiĝi pro uzo de tia formo.

Ali falis sur la genuojn (p. 31^a).

Li mallevis sin sur la genuojn (p. 120^a).

Mi opinias ke oni povas ankoraŭ korekte skribi « sur la genuoj », ĉar oni ne povas fali aŭ mallevi sin movo, kaj speciala monstro de tiu movo per akuzativo estas, en tiu okazo, tute neoportuna.

Sama rimarko ekzistas por la ekzemploj :

Se ni eliros en la koridoron (p. 215^a),

Volu enskribi la monon en nian krediton (p. 229^a), kiuj estos facile kompreneblaj se oni skribus : koridoro, nia kredito.

Estas grava danĝero proklami kiel S^{ro} Frans Swagers « pensas povi rajte konkludi ke ĝenerale ni devas sekvi la germanan uzadon koncerne *auf, über, in, k. c.* ».

Ĉar mi ne devas koni la germanan lingvon kaj ne konas ĝin; tamen mi povas uzi regule Esperanton kvankam mi tute ne scias la uzadon de la germana akuzativo.

Kiel tre prave diris Zamenhof en **Fundamento de Esperanto** : « la akuzativo dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj. » (p. 60^a).

Mi aldonas ke la kaŭzoj naskiĝas pro la nesufiĉa klareco ricevita de la verbo.

La 8^a regulo diras : *Ĉiuj prepozicioj postulas, de si mem, nominativon* (franca traduko p. 4^a : Toutes les prépositions veulent, par elles-mêmes, le nominatif) La angla traduko diras : *Ĉiuj prepozicioj regas nominativon.* (p. 10^a : All prepositions govern the nominative case).

Oni do ne povas konkludi ke en difinita okazo, la kuniranta prepozicio postulas akuzativon, kiel konkludas S^{ro} Frans Swagers.

Mi altiras ankaŭ atenton de la legantoj sur kelkaj kunmetitaj vortoj kiuj ŝajnas facile kompreneblaj sed kiuj, tamen, enkondukas ian dubon.

Ekzemple la cititaj vortoj : *akvoturnejo* (loko kie akvo turnas ?); *superakvego* (memoru ke *super* signifas, france, *au dessus de, sur*, sed sen tuŝo, p. 167^a); *survango* (ĉu tiu vorto havas saman signifon kiel lanugo kiu kreskas sur vango ?) k. t. p. Tiuj vortoj nur akiras plenan sencan kiam ili estas en frazo, akompanataj de verbo kaj de prepozicio kiuj klarigas, sen ia dubo, la ideon kiu ne estas bone difinita kiam oni prezentas tiujn vortojn izole.

Memoru ke ne estas sufiĉe kompreni vorton, sed ankaŭ komprenigi tiun vorton.

Memoru ankoraŭ ke ni uzas ĉiutage esprimojn kiuj ŝajnas al ni strangaj post pripenso, kaj tamen ĉiuj komprenas ilin kaj eĉ tiuj esprimoj eniĝis en Esperanto.

Unu el niaj sindonemaj samideanoj citis al mi la sekvantan ekzemplon. Ni diras : fermu, malfermu la pordon, la fenestron; tamen la senco estas : fermu, malfermu la ĉambron aŭ la domon, ĉar oni puŝas aŭ tiras la pordon, la fenestron. Aliflanke ni diras prave : fermu, malfermu la keston, la skatolon, kaj : levu, mallevu la pordeton, la kovrilon; ankaŭ, ŝtopu aŭ malŝtopu la botelon, tiru aŭ surmetu la korkon.

Ĉu vi dirus : ŝtopu la korkon ?

Ne; tamen vi diras : fermu la pordon ! La pordo fermas la ĉambron kiel la korko fermas la botelon. Ni do ne estu tro severaj; kiam oni skribas aŭ parolas klare kaj simple, ĉiuj komprenos kaj la trafo estos plenumita.

Ĉu vi ŝatas la komparojn ?

Ĉu jes, aŭskultu; ĉu ne, haltu !

Mi komparos la regulojn de Esperanto, plibone la Regularon, al la homa haŭto; ĝi kunpremas la lingvon kiel haŭto kunpremas la muskolojn.

Haŭto estas pli aŭ malpli densa, ĝi havas sentemajn lokojn, ĝi kovras kaj ŝirmas korpon pli aŭ malpli gracion, flekseblan, energian, fortikan; eĉ ĝi

Lode Baekelmans.

Lode Baekelmans, Antverpenano, estas juna verkisto. Li naskiĝis en 1880. Tamen, liaj kelkaj verkoj permesas vidi en li promesontan aŭtoron. Li estas malmulte literaturisto, en la senco preciza de tiu ĉi vorto, ĉar, infano de la popolo, li aperas kiel « self-made man » (memfarita homo) kaj lia stilo mem ne ĉiam estas tre pura. Sed multaj kvalitoj reaĉetas tiun ĉi difekton.

Baekelmans estas la kantisto de la stratoj, de la malaltaj homoj de la grandaj urboj, kies kutimojn, ecojn, ĝojojn simplajn li konas perfekte. Li amas ilin, li ridas kun ili, li estas kortuŝata de ili, kaj ne faras retorikon vanan. Li estas *sincera* verkisto, iom maldelikata kaj realeca kelkafoje, sed sen brutaleco, kaj ĉiam originala. Li observas akurate, kaj posedas facilan kaj ĉarmantan ironion.

Li kunhelpis ageme la fondon de la flandra movado.

Jen estas, el unu el siaj plej kuriozaj romanoj, *Marieto de Nymegen* (Marieken van Nijmegen), originalaj priskribo kaj impresoj pri la Antverpena haveno, en la punkto :

Nokta pejzago.

Antaŭ ne longe mi vagis sola. Tra la vespero mi malrapide iris flanke de la « doko », aŭdante la nedifineblan brueton, ankaŭ rigardante la lunon, kiu, en duberozkolora aŭreolo, malantaŭ la sombra nubaro staris.

Ho ! la luno, tiu granda noktlumo, amiko de fantaziuloj kiel mi, konfidentulo de la drinkuloj, lampo de la vaguloj kaj sentegmentuloj, bonega helpisto de la rabistoj kaj ŝtelistoj, ĝoja, rideta perulo de la amuloj, la luno brilis en la malgajeco de la nokto.

Estis stranga vespero ! En kompatema krepuskofajrero brulis la stratlanternoj : la stratoj estis forlasitaj kaj malvarmegaj vojoj de marĉajeta koto. Kvazaŭ okuloj, la domoj rigardis tra siaj lumigataj fenestroj; ili ŝajnis al mi plenaj je penso, paco, kaj ankaŭ plenaj je enuo. Alte, la butikoj liniĝis en la griza senlumeco, precize kiel dikaj, sataj kaj dormetantaj monstroj. Pli malproksime la ŝipoj kuŝis; iliaj mastoj penetris supre en la fermita aero; ili ŝajnis arĝentaj lancoj, ĉiufaje kiam la luno ankoraŭ aperis. Ĉu mi tie ĉi nun vagadas ? mi demandas min ? En mia ĉambro, en la trankvila rebrilo de mia bona lampo, ĉe miaj fidelaj libroj kaj mia amike ronkanta fajro, estis tamen senlime pli ĝoja ? Sed mi ne povis resti tie. Mi havis sufiĉe de tiuj dometaĵoj; mi ekkoleris en tiu ĉi aŭreola brilaĵo, miaj songoj ŝajnis al mi, tie, nesovaĝaj; mia seĝo, maldolĉa; mia pipo, gale sorbigita de nikotino.

Ekstere ĉio estis speciale, ĉarminde kora. Estis vespero, en kiu oni plenfeliĉe vidas flugeti siaj songojn en mirinda lumo, vespero dum kiu oni deziras ploregi pro feliĉeco en la brakoj de sia fianĉino, aŭ en kiu oni konfidajn aferojn volas diri.

Tiaj vesperoj estas kiel bruetoj ĉirkaŭ via kapo; ĉio estas ŝanĝema kaj neelfarita, sed kia belega promeso estas en la grandeco de la ŝanĝebleco !..

LODE BAEKELMANS.

Tradukis F. DE R.

povas ricevi malgravajn vundojn, ĝi baldaŭ resaniĝas, iafaje ĝi sin kovras per aknoj pli aŭ malpli doloraj kiujn oni malaperigas per kuraciloj aŭ kiujn nur tempo ebenigas. Haŭto kolore ŝanĝas, ĝi kutimas al ĉiuj agoj, renoviĝas post kelkaj jaroj, tamen la muskoloj aŭ plibone la homa korpo estas ĉiam la sama, ĝi kreskas, ĝi vivas; nur la haŭto aliformiĝas.

Kaj Esperanto estas ĉiam kaj ĉie la Internacia Lingvo; la regularo, haŭto ĝia, estas necesa, necesega; kiel haŭto, ĝi kutimos al ĉiuj agoj, kelkaj negravaj vundoj, tuj kaj zorge kuracitaj, ne detruos ĝin; oni eĉ diris al mi ke la haŭto renoviĝas pli forta, pli taŭga, en loko mem de vundo.

Kaj tio estas ĉefa kvalito de Esperanto, kiu permesas al ĝi vikle vivi kaj rapide kreski en retoj de kelkaj reguloj tre logikaj, tre simplaj, tre sanaj, kiel postulas vivema lingvo.

Pri la akvoj, negravaj eraroj, la tempo, tre potenca en tiu okazo, malaperigos ilin; ni helpos ĝin iomete se tio estos necesa.

JOS. JAMIN.

LA BARILEGO DE LA GILEPPE (JILEP').

Verviers (elparolu: Vervje) estas urbo en alta parto de Belgando, apud la germana landlimo. La drapteksaja industrio vastiĝis multe en tiu urbo dum la dua duono de la XIX^a jarcento, pro uzo de la vapormaŝinoj kaj konstruo de grandaj fabrikoj. Tiu industrio postulas multe da akvo por eligi la langrason el la drapo. Okazis ke la rivero *Vesdre*, kiu trafluas Verviers, ne leveris sufiĉe da akvo dum somero. Tiam oni decidis kapti la akvon de rivereto *Gileppe*, kiu fluas en profunda valetto, je 9 kilometroj oriente de Verviers.

Por tio oni trabaris la valetton per murego iom malkava ĉe la akva flanko. Tiu formo kurba taŭgas tre bone por kontraŭstari la akvan puŝon. La antaŭa flanko de la murego estas trapeza. La supra paralelo estas longa je 235 metroj, la malsupra paralelo estas 82-metra, kaj la alteco estas 47,69 metroj. La dikeco de tiu murego estas ja 15 metroj ĉe la supro. La flanko ĉe akvo estas vertikala kaj la ekstera flanko estas oblikva, tiamaniere ke la dikeco ĉe la fundamento estas 66-metra. La masonaĵo enhavas 258.323 kubajn metrojn kaj pezas 794.142.900 kilogramojn. Tiu laboro kostis sep milionojn da frankoj kaj daŭris de la 1867^a ĝis la 1878^a jaro. Ĉe la mezo de la supro staras ŝtona leono alta je 13,5 metroj kaj kies pezo estas 130.000 kilogramoj.

Ĉirkaŭata de la bela Dukarbarego (Hertogenwald) kun partoj kiuj eniras ĉarmajn valetojn, kuŝas do artefarita lago granda je 800.000 kvadrataj metroj, kiu povas enteni 12.238.000 kubajn metrojn da akvo. La murego havas ĉe sia supra parto du elfluejojn kiuj ellasas la troan akvon, tiamaniere ke, kiam la akvejo pleniĝas, la diferenco inter la akva nivelo kaj la supro de la murego estu 1,90 m. La akvo estas alkondukata al Verviers per subtera kanalo 9-kilometra. Kun aldonaj laboroj (subtera kanalo kaj ankaŭ malgranda barilo tra alia rivereto apuda) la tuta faritaĵo kostis 11 1/2 milionojn da frankoj.

F. V.

L'Esperanto et les journaux.

A un point de vue que j'oserai appeler « exégétique » il y a surtout une chose, et une grande chose, à retenir de tout ce qui s'est passé dans le monde espérantiste pendant ces derniers mois : l'attention sympathique, quelquefois même bienveillante, que les journaux et surtout ce qu'on est convenu d'appeler les « grands journaux » ont accordé à la langue internationale auxiliaire.

La cause initiale de cette attention est le Congrès. Celui de Boulogne-sur-Mer avait déjà beaucoup fait parler de lui. On n'a pas moins ergoté autour de celui de Genève. Rien que pour cela il faudra en savoir un gré infini à leurs organisateurs.

La formation d'un groupe, l'ouverture d'un cours, une conférence, une représentation théâtrale même n'excitent que médiocrement la verve de nos chroniqueurs ; mais un congrès, où plusieurs centaines de porteurs d'étoile se réunissent, parlent et banquetent ! Voilà qui est plus intéressant. Pour la première fois aussi, cette année, les agences télégraphiques se sont occupées de l'« Afero » et ont répandu, le soir même de chaque journée, aux quatre coins du monde, les décisions du congrès. Des fabricants de « mots pour rire » s'en sont mêlés, et le *Figaro*, toujours spirituel, imprimait par exemple, à la fin d'août :

Au Congrès de Genève :

— Prêtez-moi donc dix louis !

— C'est curieux, il y a encore des mots que je ne comprends pas !

Or, le rire désarme mieux que les arguments, et ceci est significatif.

On me dira peut être : « Qu'est ce que cela peut bien vouloir prouver, que les journaux ne conservent plus, vis-à-vis de l'Esperanto, l'attitude hostile qu'ils ont gardée pendant tant d'années ? Ce phénomène indique-t-il donc un progrès nouveau de notre cause ? Que nous importe l'opinion de telle ou telle feuille ! N'avons-nous pas les gens sensés pour nous ? »

Ceux qui parlent ainsi sont forts ignorants des conditions dans lesquelles vivent aujourd'hui les journaux, et surtout les « grands journaux. » Ils auraient eu raison il y a cinquante ans. Ils ont tort maintenant.

Une grande évolution s'est produite, en effet, à la fin du XIX^e siècle, dans la conception journalistique. Le journalisme d'idées, attaché à certains principes, lié à certaines causes, enchaîné à certaines façons de voir, perd de plus en plus de terrain. Les feuilles quotidiennes qui défendent nettement telle ou telle politique, qui ont une âme, une individualité propre, disparaissent peu à peu, remplacées par le journal commercial qui cherche uniquement à arriver partout et à faire le plus d'affaires possible. Les premiers auraient examiné loyalement, impartialement, l'Esperanto (lequel ne saurait être examiné partialement puisqu'il n'appartient à aucun parti et qu'il est neutre dans son essence) et l'auraient condamné — et par suite combattu et ridiculisé — ou approuvé — et par suite vulgarisé et défendu en toute occasion. Ce journalisme existe encore, et on a trouvé quelquefois certains journaux, dits de province, qui ont soutenu l'Esperanto parce que cela

leur semblait bon et juste, ou bien, fait plus fréquent, parce que quelque espérantiste notoire leur en imposait et les accablait de ses arguments.

